

Gazeto



Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

37-a Jarkolekto - Septembro 2023 - N-ro 130

Niebla

(Onubo)



Julio / Septembro 2023

Enhavo

- P. 03 Esperanto en Andaluzio.
P. 07 La preskaŭ forgesita pronomo «Ci».
P. 09 Lingva Angulo:
La konjuncio "ankaŭ".
P. 13 Poezia Angulo.
P. 14 Nuntempa Vortaro:
Atletismo.
P. 17 Folioj por Praktikado.
P. 20 Turismi en ...
Niebla (Onubo).
P.24 Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio: *La doktoroj Cordero kaj la komenco de esperanto en Almerio.*
P. 26 $E=mc^2$ Scienca Angulo:
La Fermi-paradokso.
P. 29 Flamenko:
La verdialaj kantaĵoj.
P. 31 Fervojista angulo: *Eifela fervoja ponto en Andaluzio.*
P. 33 Komikso:
Alternativaj okazigoj.
P. 39 Nun Ni. Junularaj Paĝoj.
P. 41 Andaluzia kuirarto:
Supo de Alpuharoj.
P. 43 Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio:
La homo de la sako.
P. 45 Vorto-ludoj.

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruiz, en San Fernando (Cádiz) en 1910. Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Ánfora 6 5-D
29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López
REDACTORES:
José María Rodríguez Hernández
Alejandro Burgos Escalante



*Sur la kovrilo:
Turo de la preĝejo de Nia Sinjorino de la Granato, antikva islama moskeo en Niebla (Onubo).*

ESPERANTO EN ANDALUZIO

ARTIKOLO PRI INSTRUADO DE ESPERANTO AMASE PUBLIKIGITA EN HISPANAJ ĴURNALOJ

La proeza del único instituto de España que ha resucitado el esperanto, el idioma que creó un oftalmólogo polaco en 1887: "El fin no es competir con el inglés". La heroaĵo de la sola mezgrada lernejo en Hispanio kiu revivigis esperanton, la lingvo kreita de pola okul-kuracisto en 1887: "La celo ne estas konkuri kun la angla lingvo".

Jen la titolo de artikolo aperinta sur amaso da hispanaj ĵurnaloj, paperaj kaj retaj, antaŭ kelkaj semajnoj. Ene de ĝi, oni parolas pri la spertoj de nia samideano Fabián Jiménez en siaj streboj enirigi la instruadon de la internacia lingvo en la mezgrandan lernejon "Almenara" en Vélez-Málaga (Malago), kie li laboras kiel profesoro. Oni devas diri, ke Fabián sukcesis antaŭ kelkaj jaroj oficialigi esperanton, lingvon kaj kulturon, kiel stud-objekton, sub la nomo "Esperanto kaj eŭropaj valoroj".



Fabián Jiménez, profesoro de esperanto en la Mezgrada Lernejo "Almenara" en Vélez-Málaga (Malago)

Laŭ Fabián Jiménez, la administracia proceduro por atingi la akcepton de esperanto kiel oficiala stud-objekto ne estis ege malfacila, male la vera defio estas allogi la lernantaron por elekti ĉi tiun fakon. Tamen, kiel asertas la artikolo, Fabián atingis tion sukcese. Tiel, feliĉe, la internacia lingvo altiris la atenton de dekkvino da gelernantoj en la gimnazio "Almenara" de Vélez-Málaga, krome, li sukcesis ne nur rilate la lernantaron, sed ankaŭ rilate aliajn profesorojn, kiuj lernas la lingvon.

Gratulon, Fabián, la artikolo publikigita en multnombraj hispanaj ĵurnaloj provokis kelkajn favorajn reagojn, tiel jam en la retadreso de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo oni ricevis kelkajn inform-petojn pri kiamaniere lerni esperanton.

ĜENERALA ASEMBLEO DE SEVILA ESPERANTO-ASOCIO

La pasintan 26an de januaro 2024, okazis la ĝenerala asembleo de membroj de la Asociación Sevillana de Esperanto Sevilla Esperanto-Asocio. Dum la kunveno oni elstaris la pozitivan etoson travivitan dum la pasinta Hispana Kongreso de Esperanto, okazinta en Sevilo, kiu devus signifi, laŭ

ĉies opinioj, revivigon de la Esperantomovado en la urbo Sevilo; same, oni sciigis, ke ekzistis mona profito favore al la asocio post la okazigo de la lasta hispana kongreso, kvankam oni memoras al ĉiuj membroj la neceson akuratiĝi la pagon de la jaraj kotizoj, ĉar asocio nur povas vivi kaj agadi se ĉiuj membroj kunlaboras, ankaŭ el ekonomia vidpunkto.

Krom la organizado de la hispana kongreso, la ĉefa agado de la asocio dum la pasinta jaro 2023 estis la organizo de esperanto-kurso en la Casa de las Sirenas, tie okazis ankaŭ pasintjare prezentado de ĉiuj agadoj organizitaj ĉe tiu municipa kultur-centro, ankaŭ okaze de tiu ekspozicio partoprenis la Sevilla E-Asocio.



Antonio Romero, nova prezidanto
de Sevilla Esperanto-Asocio

Pro la fakto, ke okaze de ĉi tiu jara asembleo oni devis elekti novan estraron, ĉeestantoj elektis kiel novan prezidanton S-ron Antonio Romero, ankaŭ unuanime oni dankis al eksa prezidanto, S-ro José Roldán, kiu gvidis la asocion dum la lastaj jaroj. Sendube la ĵus okazinta hispana kongreso, la streboj de la membroj rilate la disvastigon de la movado kaj la alveno de antikvaj esperantistoj en la asocion, ĉi ĉio devus signifi sukcesajn estontajn jarojn por nia lingvo kaj movado en Sevilo.

ELDONITA NOVA NUMERO DE *JURA TRIBUNO INTERNACIA*

Eldonita de Internacia Jurista Esperanto-Asocio, kunlabore kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, aperis fine de la jaro 2023 nova numero de la revuo *Jura TRIBUNO Internacia*. Ĉi tiu publikigaĵo estas la oficiala organo de la tutmonda esperantista asocio kie renkontiĝas juristoj.

La revuo aperas du-foje en la jaro kaj en sia kvindeko da paĝoj aperas artikoloj dediĉitaj al juraj branĉoj. Konkrete, sur la ĵus eldonita numero oni pritraktas jenajn temojn:

- Dungitaj soldatoj kaj sekurec-kompanioj en la Internacia Juro.
- Klimataj rifuĝintoj.
- Juraj Informoj.
- Koŭto Miksta, antikva "ŝtato" inter Portugalio kaj Hispanio.
- La kazo de la avara panisto (literaturaĵo).
- Bezono ne havas leĝon.
- Kino kaj juro.

La revuo, kiu disponas pri papera kaj interreta versioj, estas dissenditaj al membroj de Internacia Jurista Esperanto-Asocio en la kvin kontinentoj. Se iu deziras ricevi prov-ekzempleron, oni devas kontakti kun:

jurista@esperanto.ac



ALIĜU AL Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Post solvi kelkajn problemojn kun la banko, nia asocio reaktivis la konton kiun ni aranĝis por ricevi jarajn aliĝojn.

La ekzisto de ĉiuj asocioj, ankaŭ de AEU, dependas ĉefe de la kunlaborado de la membroj, pro tio ni invitas al vi pagi la kotizon por la jaro 2024.

La jara kotizo estas 20 € kiun vi povas pagi ĉe:
Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698
Asociación Andaluza de Esperanto



HAZTE SOCIO DE LA Asociación Andaluza de Esperanto

Después de algunos problemas con el banco, nuestra asociación vuelve a activar la cuenta que mantenemos para el cobro de cuotas.

La vida de cualquier asociación, también la nuestra, depende principalmente de la colaboración de sus socios, por eso te invitamos a que abones la cuota correspondiente al año 2024.

La cuota anual es de 20 € que puedes ingresar en
Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698
Asociación Andaluza de Esperanto

La preskaŭ forgesita pronomo «Ci»

Origino kaj stranta (ne)normigo.

Multaj esperantistoj ne scias, ke Esperanto havas alian ne tre uzatan duapersonan singularan pronomon. Mi parolas pri «ci», ne tre konata kaj ne ofte uzata, sed ja ekzistanta en nia komuna lingvo.


La unuan publikan ekaperon de la pronomo «ci» ni trovas en la Dua Libro, publikigita en la jaro 1888 de iu misterplena Doktoro Esperanto. Laŭ tio, kio estas skribite en la verko, «"ci" signifias la duan personon de l'ununombro sed tiu ĉi vorto estas trovata sole en la plena vortaro; en la lingvo mem ĝi preskaŭ nenian [neniam] estas uzata» (Zamenhof, 1893, p.18). Verdire, la frazo estas verdikto pri la uzebleco de «ci». En la tekstoj de Zamenhof, fakte, ni foje vidas tian pronomon kiel ilon, jen cele la reformon, jen cele la tradukadon. En la reformprojekto de 1894, Zamenhof, denove enkondukis la duapersonan singularan pronomon. Tamen, ĉi tiu pronomo ne plu estis «ci», sed «tu», ĝuste kiel en latino.

En tiu reformprojekto, ĉiuj pronomoj havis la finaĵon -u kiu, laŭ Zamenhof, temis pri «nenia gramatika finiĝo» (Zamenhof, 1907, p.7). Kiel ni ĉiuj scias, la reformprojekto ne sukcesis kaj, konsekvence, la lingvo restis tia, kia ĝi antaŭe estis. La spurojn de la pronomo ni povas sekvi ĝis la Fundamento de Esperanto, kiu estas rigardata kiel la bazoj de Esperanto: «anstataŭ "ci" oni uzas ordinare "vi" skribas Zamenhof. En la Universala Vortaro de la sama verko, ni denove trovas la pronomon «ci» (Zamenhof, 1905, p.44 kaj 95).



Uzado de «ci» en la esperanta literaturo

En la esperanta literaturo, la uzado de «ci» estas tiel malfota, ke mi devis uzi la ilon de ESF kreitan *Tekstaro*. La rezulto estis okulfrapa: «ci» estas uzata nur en malmultaj libroj kaj ne en granda nombro. Ekzemple, «ci» uzatas en tradukoj, kiel Fabeloj de Andersen (fare de Zamenhof), sed ankaŭ en originale verkitaĵoj, kiel en la romano *Ĉu li?* (verkita de Henri Vallienne). Parolante pri originale verkitaĵoj, mi mem en *Printempo en la aŭtuno* renkontis la pronomon: «Iru hejmen, ci leporhora!» (Julio Baghy, 2017, p.43).



Resume, la pronomo «ci» estas ne tre ofte utiligita kaj precipe en tradukoj, kie la distingo inter «ci» kaj «vi» estas treege grava afero por la kompreno de sociaj roloj.

Jen demandoj por vi: ĉu vi iam uzis la pronomon «ci»? Se jes, kiam? Ĉu vi iam rekontis ĝin en ia verko?

Fontoj

Baghy, J. (2017) *Printempo en la aŭtuno*. Bjalistoka Esperanto-Societo.

Halvelik, M. (2010). *Arkaika Esperanto*. Eldonaĵo de la aŭtoro.

Tekstaro. Alirebla ĉe <https://tekstaro.com/>

Zamenhof, L. (1893). *Dua Libro*. Eldonaĵo de la aŭtoro.

Zamenhof, L. (1905). *Fundamento de Esperanto*. Hachette.

Zamenhof, L. (1907) *Pri reformoj en Esperanto*. Coulommiers.

Alirebla ĉe <https://mallonge.net/1ae>

Verkis: Alejandro Burgos Escalante

(alejandroburosescalanteabe@gmail.com).



Ankaŭ es una conjunción que equivale a "también" en español. Se trata de una partícula que aparece con frecuencia en cualquier conversación, por lo que conviene conocer cómo usarla adecuadamente. *Ankaŭ* indica que algo no se encuentra solo, sino que también se le añade un o unos elementos que van precedidos por esa conjunción.

Veamos algunos ejemplos:

- *Li donis belajn donacojn al siaj familianoj kaj ankaŭ al siaj amikoj.*
El entregó unos bellos regalos a sus familiares y también a sus amigos.
- *Dum somero mi vizitos la sudon de Eŭropon kaj ankaŭ la nordon de Afriko.*
Durante el verano visitaré el sur de Europa y también el norte de Africa.
- *La arkitekto desegnis la turon kaj ankaŭ la ĉirkaŭantan parkon.*
El arquitecto diseñó la torre y también el parque circundante.

Aunque no existe una regla escrita sobre esta cuestión, el uso regular de la lengua esperanto indica que lo que se añade con la conjunción *ankaŭ* debe ir detrás de esta partícula.

**Lo que se añade con "*ankaŭ*"
se coloca detrás de esta conjunción**

Veamos algunos ejemplos para aclarar la colocación de *ankaŭ*:

- *Li parolas ankaŭ la francan lingvon.*

Él habla también francés.

(Esta frase indica que él habla algún idioma, entre los que se encuentra el francés).

Sin embargo si decimos:


- *Li ankaŭ parolas la francan lingvon.*

Él también habla francés.

(Lo que estamos indicando es que él es capaz de hacer varias cosas, y entre ellas las de hablar francés.)



Li parolas ankaŭ la francan lingvon



Li ankaŭ parolas la francan lingvon

Veamos más ejemplos para aclarar estas diferencias de sentido según la colocación de *ankaŭ*:

- *Ili vizitis ankaŭ Italion.*

Ellos visitaron también Italia

(Es decir, visitaron varios países entre los que se encontraba Italia).

- *Ili ankaŭ vizitis Italion.*

Ellos también visitaron Italia.

(Se está diciendo que hicieron varias cosas, entre las que se encuentra su visita a Italia).

Pero como se ha indicado, la colocación de *ankaŭ* antes de la palabra a la que se refiere no es una regla escrita, en tanto que el propio Zamenhof, el autor del esperanto, a veces colocaba en sus escritos y traducciones la partícula *ankaŭ* detrás de la palabra a la que se refería. Pero a día de hoy se suele colocar siempre delante.

Insistamos en la cuestión de la colocación de *ankaŭ* antes de la palabra a la que se refiere:

- *Vi donacis ankaŭ multe da mono al via filo.*
Tu regalaste también mucho dinero a tu hijo.
(Se indica que regalaste varias cosas, entre las que se encuentra una gran cantidad de dinero a tu hijo).
- *Vi donacis multe da mono ankaŭ al via filo.*
Tu regalaste mucho dinero también a tu hijo.
(Se indica que regalaste mucho dinero quizá a varias personas, entre las que se encontraba tu hijo).
- *Vi ankaŭ donacis multe da mono al via filo.*
Tu también regalaste mucho dinero a tu hijo.
(Se indica que hiciste varias cosas, entre las que se encontraba regalarle mucho dinero a tu hijo.)

"Ankaŭ" no tiene necesariamente que referirse solo a una palabra, ya que también puede introducir una frase completa. Veamos algunos ejemplos:

- *Li parolas multe ankaŭ kiam li devus silenti.*
Él habla mucho, también cuando debería guardar silencio.
(En este caso *"ankaŭ"* se refiere a *"kiam li devus silenti"* y no solo a una palabra en concreto.)
- *La urbo estas vizitinda ankaŭ kiam neĝo inundas la stratojn.*
La ciudad es digna de ser visitada también cuando la nieve inunda las calles.

"Ankaŭ" puede ir también acompañado de algunas preposiciones, por ejemplo *"sed"* (pero, sino). En estos casos la construcción gramatical suele ser:

ne nur.... sed ankaŭ (no solo...sino también)

Ŝi estas amata ne nur de siaj gepatroj, sed ankaŭ de siaj filoj.

Ella es amada no solo por sus padres, sino también por sus hijos.

Ne nur sed ankaŭ

No solo ... sino también

También podemos encontrar la construcción "*eĉ ankaŭ*", cuyo significado sería "incluso también".

- *Kelkaj birdoj povas naĝi, ekzistas aliaj kiuj kapablas eĉ ankaŭ subnaĝi.*
Algunas aves pueden nadar, existen otras que son capaces incluso también de bucear.

Con "*ankaŭ*" también podemos indicar la idea de "tampoco", añadiéndole la negación "*ne*". Veamos algunos ejemplos:

- *Mi ankaŭ ne vizitis ankoraŭ Francion.*
Yo tampoco he visitado todavía Francia.

Ahora bien, si la frase es negativa no es necesario añadirle la negación "*ne*", en tanto que ya se encuentra la negación en otra parte de la frase, ejemplo:

- *Mi vizitis Italion, tamen mi ne manĝis picon kaj ankaŭ lasanjon.*
Yo he visitado Italia, sin embargo no he comido pizza ni tampoco lasaña.
(No debe decirse "*kaj ankaŭ ne lasanjon*" en tanto que ya existe una previa negación con el uso de "*ne*".)

Ankaŭ: también

Ankaŭ ne: tampoco



Picasso estas pentristo. Ankaŭ mi.
Picasso estas hispano. Ankaŭ mi.
Picasso estas komunisto. Ankaŭ ne mi.

- Salvador Dalí -



Federico García Lorca (1898-1936)

La malfidela edzino

Ĉar mi kredis ŝin fraŭlino
al river' mi kun ŝi iris,
sed ŝi estis jam edzino.

Estis en Jakoba nokto
kaj pro kvazaŭ kompromiso
la lanternoj estingiĝis
kaj ekĉirpis arde griloj.
Ŝiajn mamojn mem dormintajn
palpis mi ĉe stratofino
kaj subite ili floris
kvazaŭ hiacinta spiko.
La subjupo amelita
sonis kiel pec' da silko
same kiel sonas ŝtofon
kiun ŝirus dek tranĉiloj.
Sen arĝentolumaj ludoj
arboj kreskis en fikcio
kaj hundar-horizonto bojis
ĉe la transrivera nigro.

Preter la rubusoj, junkoj,
dormoplantoj kaj vepr-pikoj
faris mi sub ŝiaj haroj
etan foson sur la ŝlimo.
Mi demetis la kravaton,
ŝi la bluzon de virino,
mi la revolvero-zonon,
ŝi gajnojn el pur-silko.

Ne troveblas fajnan haŭton,
nek konketoj, nek lilioj,
nek kristaloj kun lunlumo
helas kun pli granda brilo:
ŝiaj kruroj el mi fuĝis
kiel fiŝo je surprizo,
la duono ŝajne brulis
plena la duon' de frido...
Mi trakuris tiun nokton
per brilperla ĉevalino
la plej belan el la vojoj
sen la selo kaj sen bridoj.
Mi, ĉar viro, ne konfesos
kiaj estis ŝiaj diroj,
lum' el saĝ' kaj diskretemo
diktas al mi prudentiĝon.
Ni forlasis la riveron,
ŝin malpuris sabl' kaj kisoj,
ja batalis kontraŭ l' vento
blankaj glavoj de l' iridoj.

Mi kondutis laŭ mi estas:
kiel vera ciganido,
silkan kudrilujon flavan
donis mi al ŝi kun digno.
Kaj ne volis mi ŝin ami,
ĉar estante jam edzino
ŝi survoje al rivero
ŝin deklaris tuj fraŭlino



NUNTEMA VORTARO

ATLETISMA VORTARO



Sprintoj

100-metra kurado / 200-metra kurado
400-metra kurado



Mezlongaj Kuroj

800-metra kurado / 1500-metra kurado



Longaj Kuroj

5000-metra kurado / 10.000-metra kurado



3000-metra obstaklokuro



110-metra barierokuro



Stafetkurado

4 x 100-metra / 4 x 400-metra



Maratono



Marškurado

20-kilometra / 50-kilometra



Globjeto



Lancojeto



Diskojeto



Marteljeto



Longosalto



Trisalto



Altosalto



Stangosalto



Dekatlono



Heptalono



Olimpiaj Ludoj okazos en Parizo
de la 26-a de julio ĝis la 11-a de aŭgusto de 2024.



Folioj por praktikado

MONATO DE FANTOMOJ EN ĈINIO

Laŭ Taoismo, la **15-a tago** de la sepa monato de la luna kalendaro estas la Tago de fantomoj. **La tutan sepan monaton** oni nomas Monato de fantomoj. Taoismo instruas, ke en tiu monato la pordo de la Infero **estas malfermita**.

Ĉinoj kredas, ke **oni regalu** fantomojn, kiuj **venas el** la infero en la monato sepa. Ĉiuj temploj festas en ĉi tiu monato. Ĉinoj kredas, ke regalado al inferaj fantomoj alportos bonŝancon. Homoj ne aranĝas gravajn aferojn dum tiu monato, ekzemple aĉeti domon, fari gravan kontrakton, edziniĝi, ktp. **Gepatroj ne volas, ke iliaj gefiloj vojaĝu tiumonate. Plenkreskuloj ne ŝatas, ke iliaj infanoj alproksimiĝu al akvo.** Ili timas, ke iu akvo-fantomo povus tiri la infanon en la akvon por **anstataŭi** ĝin kiel fantomon.

Oni eĉ ne diru la vorton “fantomo”, ĉar la vorto mem povus voki ilin. La homoj nomas fantomojn “bona frato”, **por ke la fantomoj ne misfaru al ili**.

> 15-a tago

Recordemos que en esperanto los números ordinales se forman añadiéndole la terminación "a". Realmente lo que se está haciendo es convertir en adjetivo al numeral. Para representar de manera escrita al número ordinal podemos hacerlo de dos maneras, generalmente si el número está compuesto por una palabra no demasiado larga, ej. *unu*, *du*, *tri*, le añadiremos la letra "a", así diríamos *unua* (primero), *dua* (segundo), *tria* (tercero)... Pero si el número está compuesto por varias cifras, p.ej. *dudek kvin* (25) lo mejor para escribirlo es añadirle simplemente un guión más la letra "a" o simplemente esta letra, así *25-a* (vigésimoquinto). Por supuesto a la hora de leerlo diremos "*dudek kvin*", es decir, *dudek kvin* más la terminación "a".

> la tutan sepan monaton

En español decimos "todo el séptimo mes", es decir, colocamos el artículo determinado "el" o "la" detrás de "todo". Si traducimos directamente al esperanto según la construcción gramatical española, entonces diríamos "*tutan la sepan monaton*". Pues bien, volvemos a recordar que no debemos traducir directamente, en tanto que en esperanto hay construcciones distintas al español. Una de ellas es cuando nos referimos a la idea de "todo el", en esperanto diremos "*la tuta..*" y no "*tuta la*".

> estas malfermita

Aunque no es muy habitual usar verbos compuestos en esperanto (verbo *esti* + participio), no hay ningún problema en hacerlo. En el ejemplo encontramos el presente del verbo ser "*estas*" más "*malfermita*", se trata del participio de pasado del verbo "*malfermi*". La traducción serían "está abierta", en este caso "*la pordo de la Infero estas malfermita*" (la puerta del infierno está abierta).

> oni regalu

El verbo "*regali*" es lo que diríamos "un falso amigo", es decir, una palabra tan similar a otra de nuestro idioma que automáticamente la traducimos como esa palabra. El verbo "*regali*" nos recuerda a "regalar", sin embargo no significa eso, sino "tratar bien, agasajar" -aunque hay que reconocer que la idea es muy aproximada. En el ejemplo aparece el pronombre impersonal "*oni*" -se- más la forma en imperativo del verbo *regali*. Podría traducirse como "que se trate bien, que se agasaje".

> venas el

Ya hemos visto en otras ocasiones la preposición "*el*", significa "de, desde" con un sentido de extracción, de salida de algún lugar. *Mi prenas libron el biblioteko*, podría traducirse como "yo cojo un libro de la biblioteca", es decir tenemos la idea de que lo hemos extraído de un lugar concreto. En el ejemplo del texto se dice "*kiuj venas el Infero*", y lo traducimos como "los que vienen del infierno". Si hubieramos usado la preposición "de" habríamos indicado un lugar, pero usando "*el*" queremos concretar un poco más, diciendo que realmente viene sacado de un lugar, extraído de algún sitio, en este caso de *la Infero* (del infierno).

> **Gepatroj ne volas, ke iliaj gefiloj vojaĝu tiumonate.**

Vamos a centrarnos en esta frase, porque a veces los hispano-parlantes nos liamos un poco cuando usamos en esperanto el subjuntivo. En la frase se dice que los padres no quieren algo "*Gepatroj ne volas*". Si en ese algo que se quiere, que no se quiere, que se ordena... aparece un verbo, este irá en subjuntivo. En el ejemplo lo que no quieren los padres es que sus hijos viajen en ese mes, es el mes de los fantasmas según el Taoísmo, así que hay que tener cuidado.

En esperanto la forma subjuntiva de los verbos se llama realmente volitivo y se forma con el final "*u*", propio del imperativo. Es normal que esto sea así, porque en estas frases hay algo que se ordena, que se quiere o que no se quiere, como ocurre en este caso. Veamos algunos ejemplos:

- *La direktoro volas, ke la laboristoj ne perdu tempon dum la matenmanĝo.*
El director quiere que los trabajadores no pierdan tiempo durante el desayuno.

Vemos que la estructura es la misma, alguien quiere algo, en este caso el director. Lo que quiere es que no pierdan el tiempo los trabajadores, así que esa acción que se desea o que se ordena aparece en subjuntivo o volitivo: *ne perdu tempon*.

> **Plenkreskuloj ne ŝatas, ke iliaj infanoj alproksimiĝu al akvo.**

Se trata de la misma construcción que hemos visto anteriormente. A los mayores no les gusta algo (*Plenkreskuloj ne ŝatas...*). ¿Qué es ese algo? Que sus niños se aproximen al agua. El verbo aproximarse aparece con la terminación "*u*" del subjuntivo o volitivo. Veamos algún ejemplo con el verbo ŝati:

- *Mi ŝatas, ke vi regalu viajn geamikojn.*
Me gusta que te portes bien -que agasajes- a tus amigos.

> **anstataŭi**

Es un verbo que tiene su origen en la conjunción "*anstataŭ*" que significa "en vez de". Su traducción sería "sustituir".

> **por ke la fantomoj ne misfaru al ili.**

De nuevo encontramos la forma del subjuntivo o volitivo, con el final "*u*" en el verbo. La traducción sería "para que los fantasmas no les hagan algo malo a ellos". En español también usamos el subjuntivo en esta frase.



Je 28 kilometroj de la urbo Onubo troviĝas la vilaĝo Niebla, kiu stariĝas pinte de monteto apud la rivero Tinto. La unua homa setlejo en tiu zono datumiĝas jam dum la Ferepoko, de tiu tempo estas eble vidi en la ĉirkaŭaĵoj de la urbo kelkajn dolmenojn. Poste, dank' al la tarŝiŝa civilizacio, ĉi tiu loko fariĝis grava komerca centro, tiam ĝi estis konata kiel *Ilípula*.

Fenicoj subtenis komercajn rilatojn kun *Ilípula*, tiam, estis eble navigadi

tra la rivero Tinto. El tie, fenicoj profitis la mineralan riĉecon de la zono. Romianoj nomis ĝin *Ilipla*, ili konstruis ŝtonan vojon, kiu komunikis tiun zonon kun Italiko, la plej grava romia urbo en la sudo de la Ibera Duonisulo. Romianoj plifortigis la jam ekzistantajn tarŝiŝajn muregojn.

Poste, visigotoj nomis la urbon kiel *Elepla*, ili konstruis kristanan templon kiu havis eĉ propran episkopon. En la jaro 713 islamanoj konkeris la urbon, kiu ricevis la nomon *Lebla*. Post la diseriĝo de la Kordova kalif-lando, la urbo fariĝis regno, poste konkerita de tiu de Sevilo. En la jaro 1234, dank' al islama Muza Abenmahfot la urbo sendependiĝis, la regnolando etendiĝis de la enfluejo de la rivero Gvadalkiviro ĝis la nuntempa portugala regiono Algarvo.

En la jaro 1262 la kastilia reĝo Alfonso la 10-a konkeris la urbon. Dum la sieĝo de la urbo unuafoje oni uzis pulvon en Eŭropo kun militaj celoj. Post la konkero de la urbo, kiu ricevis la nomon *Niebla*, oni permesis al islamanoj loĝi en la urbo, kvankam post kelkaj jardekoj la kristanigo estis deviga.



Blazono de Niebla

La reĝo mem kreis la graf-landon Niebla, kiu estis donita al la familio Guzmán kaj poste al la Duko de Medina Sidonia. Ĉi tiu nobela familio starigis en Niebla preĝejojn, palacojn kaj monaĥejojn.

En la jaro 1508 la reĝo Ferdinando petis la retrocedon al kastilia reĝo de ĉiuj kasteloj en Andaluzio. Ĉar temis pri reĝa ordono ĉiuj obeis, escepte ĉe la graf-lando de Niebla, kiu ne akceptis la reĝan peton, tiel la kastelo restis sub la regado de la duko de Medina Sidonia. Tio provokis la okupon de la urbo fare de 1500 kastiliaj soldatoj, kiuj prirabis la urbon kaj murdis multajn enloĝantojn. Ĉi tio estas konata kiel la "*disrabado de Niebla*".

Depost tiam, la urbo ekigis sian dekadencan. La lisbona tertremo de la jaro 1755 kaŭzis grandajn arkitekturajn damaĝojn, tiam multaj konstruaĵoj detruigis.

Fine de la 19-a jarcento la fervoĵa servo atingis la vilaĝon. Niebla fariĝis tre grava komerca loko, tra kie pasis vagonaroj kun mineralaj resursoj de la proksimaj minejoj de Riotinto. Bedaŭrinde, fine de la 20-a jarcento, oni fermis la fervoĵan linion.

Nuntempe, Niebla estas vilaĝo kun preskaŭ 5000 homoj, kies ĉefa ekonomia rimedo estas la terkulturado.

Monumentoj

• Murego de Niebla

Ekigita de la tarŝiŝa civilizacio kaj poste daŭrigita de romianoj kaj islamanoj, la murego de Niebla laŭlonge mezuras 2 kilometrojn. Entute 50 defend-turoj estas konstruitaj apud ĝi. Antaŭ kelkaj jaroj, oni lanĉis la ideon proponi al UNESKO la kvalifikon de ĉi tiu monumento kiel Mondan Heredaĵon.



• Preĝejo de Sankta Maria de la Granada.

Tie, kie hodiaŭ stariĝas la plej grava preĝejo en Niebla, oni konstruis unue visigotan templon, kiu estis la sidejo de la tiama episkopo de la urbo. Post la alveno de la islamanoj, ĝi fariĝis moskeo. Fine oni konstruis katolikan preĝejon inter la 15-a kaj la 16-aj jarcentoj laŭ mudehara stilo.

• Kastelo de Niebla

Ĝi estas konata ankaŭ kiel la kastelo de la Guzmanes, pro la nobela familio kiu regis la vilaĝon dum kelkaj jarcentoj. Sub la konstruaĵo aperis romiaj, visigotaj kaj islamaj restaĵoj, tamen la konstruo de la kastelo vere okazis post la kastilia konkero de Niebla. La lisbona tertremo de la jaro 1755 kaŭzis grandajn kaj gravajn damaĝojn, ĉefe en la muregoj kaj en la ĉefturo. Same, dum la napoleona invado de Hispanio, komence de la 19-a jarcento, la francaj trupoj detruis la muregojn ĉirkaŭ la kastelo.

• Dolmenoj

La plej vizitinda dolmeno estas tiu konata kiel "Dolmeno de Soto", kiu situas je 5 kilometroj de la urbo. Temas pri funebra komplekso eltrovita en la jaro 1923, sed starigita, laŭ esploroj, antaŭ 5000 jaroj.

Festoj

La visigota Sankta Valabonso, kiu naskiĝis en Niebla en la 9-a jarcento, estas la patrono de la vilaĝo. Dum la



Preĝejo dediĉita al Sankta Maria de la Granada

monato junio okazas religia parado honore al sanktulo kaj poste, popola kermeso.

En la monato februaro okazas popola komuna festo ĉirkaŭ la preĝejo de la Virgulino de la Pino, kampara loko apud Niebla. Tiam, oni povas gustumi la tipan rostitan panon kun oliv-oleo kaj ajlo, akompanita de bongustaj sardinoj.



Dolmeno de Soto

Dum la lasta semajnfino de la monato majo okazas pilgrim-festo en la kamparo. Nieblanoj tiam vestas sin en tipaj vestaĵoj. Ili, sur ĉevaloj, ĉaroj kaj ĉaretoj, renkontiĝas apud preĝejo.

Gastronomio

Bongustaj legomoj produktitaj en la Niebla kamparo estas la bazo de la loka gastronomio.

Tiel, la spinaca kirlaĵo kaj la ruĝaj faboj, kie dolĉa papriko ĉefrolas. La legoma kuirado kun sovaĝaj fungoj, kikeroj kaj sekigita moruo estas gustuminda frandaĵo. Rilate viandaĵojn, oni devas gustumi ŝaf-ŝtufadojn kun terpomoj, laŭro, papriko kaj timiano.

Kastelo de Niebla



***Venontnumere Turismi en ...
SAN ROQUE (Kadizo)***





Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.

La doktoroj Cordero kaj la komenco de esperanto en Almerio

En la jaro 1909 la almeria doktoro José Cordero Soroa sciigis al ĵurnalisto, ke la du plej gravaj figuroj en la universo estis Doktoro Zamenhof, aŭtoro de la internacia lingvo Esperanto kaj S-ro Rowland Hill, kreanto de la unua poŝtmarko. Dank'al ĉi tiu frazo estas eble koni la du plej gravajn ŝat-okupojn de ĉi tiu prestiĝa almeria kuracisto, do, esperanton kaj filatelon.

La Doktoro José Cordero Soroa naskiĝis en Almerio en la jaro 1880. Li studis medicinon en la Universitato de Granado, tie li eĉ fondis sciencan revuon, *La Gaceta Médica Escolar*, kun la celo aperigi artikolojn de la medicinaj studentoj. Li finis siajn studojn 21-jaraĝa. Li specialiĝis pri oftalmologio en Granado mem kaj poste en Parizo. Do, kiel Zamenhof, li estis okulkuracisto, tamen en sia posteno kiel municipa kuracisto en Almerio, li devis priatenti ĉiajn malsanulojn.

Oni ne scias kiam li ekkonis la internacian lingvon, verŝajne tiu unua kontakto povus okazi kiam li daŭrigis



D-ro José Cordero Sosa
en la jaro 1909

siajn medicinajn studojn en Parizo. Tamen, tio kio estas certa, estas la fakto, ke en aprilo de 1908 renkontiĝis en la domo de Francisco Cordero Meca, patro de la D-ro Cordero Sora, dekkvino da esperantistoj pretaj fondi lokan grupon. Tiel, oni povas diri, ke ne nur la doktoro José Cordero Sosa, sed ankaŭ lia patro, Francisco Cordero Meca, parolis esperanton. Oni povus eĉ pripensi ĉu eble la scivolemo rilate la internacian lingvon fare de José Cordero Sosa devenis reale de lia

patro, la doktoro Francisco Cordero Meca (1849-1930). Alie, Francisco Cordero Meca ankaŭ estis tre klera homo, li fondis en Almerio la revuon *La Voz Médica* kaj kiel municipa kuracisto li ricevis subvencion por vojaĝi en la francan urbon Marsejlo, por pristudi epidemion kies origino situis ĉe la tiea haveno, oni ne devas forgesi, ke ankaŭ Almerio estas urbo kun grava haveno ĉe la Mediteranea maro.

Do, oni povas aserti, ke ambaŭ doktoroj Cordero, kaj Francisco Cordero Meca kaj José Cordero Sosa, parolis esperanton, tamen neniu datumo povas klarigi kiu el ambaŭ influis sur la alian. Kiel dirite, en aprilo 1908 renkontiĝis 17 homoj ĉe la domo de Francisco Cordero Meca por fondi esperanto-grupon, kun la nomo "Almeria Esperanto-Grupo".



D-ro José Cordero Sosa
dum la 1940-aj jaroj

Prezidanto estis nomumita Francisco Cordero Meca. Kelkajn jarojn poste la grupo nomis lin "honora prezidanto", post la donaco de lia esperantista biblioteko al la grupo, tiutempe li estis preskaŭ 70-jaraĝa.

La ĉefa agado de la ĵus naskita almeria grupo estis instrui la lingvon, ne mankis gelearnantoj kaj en la ekzamena tribunalo ĉiam troviĝis la Doktoro Cordero Meca. Alia grava agado de la almeriaj esperantistoj estis akcepti eksterlandajn vizitantojn. Tiel, la sekretario de la grupo petis al la membroj ne forgesi la ĉiusemajnan renkontiĝojn je la 15:00-a horo dimanĉe, ĉe la sidejo de la grupo, unuamomente en la strato Espejo 10 kaj poste ĉe la Placo de la Merkato 22, ŝajnas, ke la grupo estis sufiĉe forta por atingi propran sidejon post la unua renkontiĝo ĉe la prezidanto.

Kiel dirite, Francisco Cordero Meca forpasis en la jaro 1930. Lia filo, Jose Cordero Sosa daŭrigis sian intereson rilate esperanton kaj filatelon. Li mem agnoskis, ke ambaŭ aferoj interrilatiĝis, sendube lia korespondado kun aliaj esperantistoj en la tuta mondo pligrandigis sian poŝtmark-kolekton. Kiel en aliaj lokoj de Hispanio, kia ajn agado favore al internacia lingvo ĉesis dum la hispana milito. Post tiuj teruraj jaroj José Cordero Sosa estis nomumita dekano de la almeriaj kuracistoj, sendube kiu ajn mencio pri lia esperantisteco ne rezultis tre konvena. Li forpasis en la jaro 1960.



$E = mc^2$ *Scienca Angulo*

La Fermi-paradokso

D-ino Ellie Arroway (Jodie Foster) en la filmo "Contact" (Kontakto, Warner Bros Pictures, 1997), asertis sur la lasta filmo-sceno, ke se ekzistas nur unu inteligenta civilizacio ĉe la ne-imageble vasta universo, tio ja estus misutiligo de spaco. Tio ja estas vera! Do, oni povus kalkuli, prefere kun scienciaj fundamentoj, kiom da planedoj troviĝus en la universo kie loĝas inteligentaj entoj? Se temas pri vivo sur la universo, ne estas same la ekzisto de unuĉela vivulo sur akvo ol inteligenta civilizacio kapabla sendi kosmo-ŝipojn en la spacon, ambaŭkaze temas pri planedo kun vivaj entoj, tamen ne ambaŭ estus inteligentaj.


La usona astronomo Francis Drake (1930-2022) sciigis siajn kalkulojn, post komplika ekvacio li diris, ke apud nia galaksio troviĝas proksimume 10 inteligentaj civilizacioj. Postaj kalkuloj pligrandigis tiun nombron ĝis 30. Verdire, tiuj kalkuloj nur rilatas al apudaj galaksioj, la universo estas vastega, krome ĝi pli kaj pli entendiĝas, do la ekzisto de inteligentaj civilizacioj sur malproksimegaj galaksioj tute ne gravas, ĉar kiu ajn kontakto, simple, estus tute malebla.



Tamen, se laŭ tiuj sciencaj kalkuloj, povus ekzisti inter 10 kaj 30 inteligentaj civilizacioj pli-malpli proksime de nia galaksio, kaj ni ankoraŭ kontaktis kun neniu el ili, jen paradoksa afero. Ĉi tiu estas la "Fermi-paradokso", formulita de la fizikisto Enrico Fermi en la jaro 1950.

Resume ĉi tiu paradokso diras: "la kutima kredo, ke ekzistas multe teknologie avancintaj civilizacioj en nia universo, kombinita kun niaj

observadoj, kiu sugestas la malon, estas paradoksa kaj aludas, ke aŭ nia kompreno aŭ niaj observadoj estas eraraj aŭ ne kompletaj".



Enrico Fermi
1901-1954

Kompreneble, sciencistoj reagis al tiu paradokso kun la celo proponi solvojn al la problemo pri "ebla ekzisto de inteligentaj civilizacioj kontraŭ manko de kiu ajn kontakto kun ili".

Kelkaj sciencistoj neas la ekzisteblon de eksterteraj civilizacioj. Kompreneble, ekzistas pruvoj nek kontraŭaj, nek favoraj rilate la ekziston de ili. Drake, en siaj kalkuloj, asertis, ke ĉiuj planedoj kie troveblas akvo, tie vivo ekzistas. Sendube, akvo ekzistas ekster nia planedo, tamen postaj studoj pruvis, ke ne nur akvo

necesas por aperigi vivulojn, ekzemple, devas ekzisti ankaŭ atmosfero por eviti la radiadon de proksima stelo, ankaŭ estas necesa la ekzisto de sufiĉe granda planedo, kapabla altiri eblajn meteoroidojn. Se tiu planedo ne ekzistas, aŭ ĝi ne estas tiel granda, meteoroidoj povas fali sur la planedon kie vivo ekaperas kaj detruu ĉiujn vivulojn.

Aliaj sciencistoj asertas, ke kvankam vivuloj povas ekzisti sur aliaj planedoj, eble ili posedas memkonscion nur por supervivi. Tiel, ofte estas pli utile esti granda kaj danĝera estulo por supervivi ol esti inteligenta. Kompreneble, tia civilizacio ne povus interkomuniki kun aliaj, simple ĉar ili ne serĉas kontaktojn kun aliaj inteligentaj estuloj.

Aliaj esploristoj asertas, ke unu el la karakterizaĵoj de la plej inteligentaj civilizacioj estas ilia kapablo memdetruigi. Tio ja veras, nia civilizacio sur la Tera planedo, samtempe al ni kapablo sendi kosmoŝipojn, produktis sufiĉe gravajn armilojn por detruu sin mem. Do, povus okazi, ke ekstera inteligenta civilizacio jam memdetruigis.

Aliaj solvoj al la fermi-paradokso, asertas, ke la kaŭzo de tiu nekontaktado inter civilizacioj estas la grandegaj distancoj. Laŭ sciencistoj, la plej proksimaj planedoj kapablaj enhavi inteligentajn stulojn troviĝas je 1030 lumojaroj, tio signifas, ke kiu ajn radioelsendo sendita de civilizacio

por komuniki kun alia, bezonus pli ol 2000 lumojarojn. Alia afero, estas ke tiu signalo devas esti sendita en la ĝustan direkton kaj en la ĝusta tempo por ricevi ĝin. Krome, ambaŭ manieroj de komunikado nepre devas esti similaj, ekzemple, imagu ke du homoj estas proksimaj, kaj unu uzas morsan telegrafon kaj la alian smartfonon, kompreneble tiu komunikado, eĉ se proksima, ne estus ebla.

Fine, aliaj opinias, ke la plej tikla eraro de la studoj kiuj celas solvi la fermi-paradokson estas konsideri, ke ĉiuj eblaj inteligentaj civilizacioj en la universo estas similaj kaj kun identaj celoj.

Verdire, vivuloj adaptiĝas al la medio kie ili kreskis kaj evoluis. Kompreneble ne ĉiuj planedoj, eĉ ne ĉiuj galaksioj estas similaj al nia planedo kaj al la Lakta Vojo. Tiel, sur tiuj foregaj planedoj, vivuloj povas ekzisti sub malsimila gravito, densenco, metabolismo aŭ uzi aliajn energi-fontojn. Same, celoj de tiuj vivuloj nepre estas similaj al tiuj niaj. Ni ja serĉas kontaktojn en la universo, sed povas okazi, ke eksterteraj vivuloj ne sentas tiun saman bezonon.



Esperanto, ponto inter popoloj





Flamenko

La verdialaj kantaĵoj

La verdialaj kantaĵoj apartenas al muzika repertuaro ludita de muzikistaroj en la malaga montaro. Ĉi tiu muzik-stilo estis ludata ĉefe dum la festo de la Masakro de la Senpekuloj. En Andaluzio ĉi tiu festo estas ligata ankaŭ al sensencaj frenezaĵoj. Jen la origino de tiuj kantaĵoj, tamen poste ili estas ludataj en kiu ajn festo de la provinco Malago.

La nomo "verdialo" rilatas al regiono de la malaga provinco kie oni rikoltas maturajn verdajn olivojn, kiu estas konataj kiel "*verdiales*". Do, tiu regiono estas lulilo de ĉi tiuj kantaĵoj, laŭ kantas jena strofo:

*Mi venas de Verdialo,
de Verdialo mi venas,
tie mi vidis knabinon
de ŝi mia koro plenas.*

La originon de ĉi tiuj kantaĵoj oni ne konas ekzakte. Vere, la rapida ritmo uzata dum la kantado aperis dum la 19-a jarcento, bazita sur la falmenka stilo *abandolao*. La verdialaj kantaĵoj konsistas el kantita fandango akompanita de malgranda muzikistaro, tie troviĝas violono, gitaroj, tamburino kaj kastanjetoj, ofte ankaŭ liuto.



Bando da verdialaj kantistoj en Malago

La muzikistaro estas gvidata de homo nomita "vilaĝestro", li havas bastonon kiel municipaj aŭtoritatuloj, ĉar li komandas la muzikistojn. Alia homo, la standartisto, portas kaj flirtigas rapide flagon, ĉu la hispana, ĉu la andaluzia. Antaŭtempe alia homo sonorigis bukconon por averti pri la alveno de la verdiala bando.

Rilate la vestaĵojn de la muzikistoj, pri ties origino ne ekzistas komuna akordo. Muzikistoj uzas ĉapelojn ornamitajn per buntaj floroj, juveloj kaj speguletoj. El la ĉapelo mem

pendas multkoloraj bendoj. Oni diras, ke la origino de ĉi tiuj ornamaĵoj troviĝas ĉe la andaluziaj moriskoj de la 16-a jarcento; tamen aliaj fakuloj opinias, ke ĝi devenas de la festo dum kiu aperis ĉi tiu muzik-stilo, tio estas: la festo por memori la masakro de la senpekuloj, aŭ mortigo de ĉiuj infanoj, ordonita de la reĝo Heredo tuj post la naskiĝo de Jesuo. Tamen, dum ĉi tiu festo en Andaluzio oni plenumas frenezajn agojn, do, vestaĵoj povas esti buntaj kaj spritaj.

Kvankam verdialoj vere apartenas al la popola folkloro de la malaga provinco, kelkaj flamenkaj kantistoj ludis verdialajn kantojn, ekzemple Juan Breva, kiu dum la 19-a jarcento malrapidigis la frenezan stilon de la verdialoj, ĉi tiu stilo eĉ povus esti konsiderita kiel la origino de la *malagueña*, alia flamenka stilo.

La plej ofta motivo de la verdialaj kantaĵoj estas la amo, jen kelkaj strofoj:

*Se mian viziton vi deziras.
alkatenu jam vian hundon.
Ĝi jam tri-foje min vundis
post vidi vian vizaĝan brunon.*

*Ĉiuj bonaj kantistoj
akompanas belsonan violonon,
tamen, mi ne estas tia,
pro tio de vi, mi havas bezonon.*



*Vivu la bela urbo Malago
kaj ĝiaj parkoj plenaj de floroj,
kaj ties moskatela vino,
kaj la vojo al vilaĝo Vélez,
tie troviĝas mia amata knabino.*

Eblas vidi verdialan kantaĵon en YouTube ĉe:
<https://www.youtube.com/watch?v=dX7nZru-ZCc>



Fervojista Angulo

Ejfela fervoja ponto en Andaluzio

Fine de la 19-a jarcento, la Sudhispana Fervoja Kompanio decidis konstrui fervojan linion inter Linares kaj Almerio. La ĉefa celo de ĉi tiu linio estis la transportado de mineraloj de la minejoj de Linares (Jaeno), la plej gravaj en la mondo rilate plumban mineralon, en la mediteranean havenon de Almerio. Ĝuste ĉe la kilometro 104-a de la linio estis necese kruci la valon de la rivero *Guadahortuna*, ĉe loko nomita *El Hacho* en la provinco Granada.

La fervoja kompanio mendis la konstruon de ponto al arkitekta ateliero de Gustave Eiffel en Parizo. Liaj kunlaborantoj Duval kaj Boutilliea

desegnigis la projekton sur la kontrolo de Eiffel mem. La projekto realigota estus tute simila al la ponto de Sankta Johano en Porto (Portugalia). La konstruo realiĝis de la jaro 1894 ĝis 1897 kaj fine, ĝi ekfunkciis la 22-an de marto 1898.

La ponto mezuras 624'6 metrojn longe kaj 49'85 metrojn alte ĉe la plej alta pinto de la konstruaĵo. Oni starigis 7 metalajn pilastrojn kaj aliajn 4 ŝtonajn ĝuste ĉe la ekstremoj. La bazoj de ĉiu pilastro pezas 246 tunojn, do la stabileco de la pilastroj kaj de la ponto mem estas certigita. Oni uzis feron por la konstruo. Grava novaĵo de la ponto estis la konstruo de pied-iraj pasejoj



Ponto del Hacho en Granada, la antikva el fero apud la moderna el betono

flanke de la fervoja linio kaj suba koridoro sub la rela platformo, kun la celo faciligi ontajn riparadojn de la linio.

La konstruo de la ponto, nomita Ponto del Hacho -pro la loko kie ĝi situas- estis gvido-punkto en la hispana fervoja arkitekturo. Temis pri la plej longa ponto el fero konstruita en nia lando. Tion ebligis centoj da laboristoj dum preskaŭ 10 jaroj, eĉ oni konstruis vilaĝeton por ili kaj familianoj, ĝi ekzistis ĝis la mezo de la pasinta jarcento.



Vagonaro trapasanta la ponton del Hacho fine de la 19-a jarcento

Tamen, la ponto estis pripensita por vagonaroj de la 19-a jarcento. Komence de la 20-a, oni ekuzis pezajn dizelajn vagonarojn kaj, verdire, la ponto ne povis elteni tiom da pezo. Krome, la minejoj de Linareso jam ne estis profito-donaj meze de la 20-a jarcento, do la elfosado de mineraloj ĉesis. Pro ĉi ĉio la ponto restis forgesita kaj malzorgita, same la apuda stacidomo de *Alamedilla* fermiĝis.



Riparado de la ponto en la jaro 1904

Dum la jaroj 1970-aj, oni decidis renovigi la fervojajn infrastrukturojn de tiu linio, tamen, la kosto de la riparado de fera ponto de la 19-a jarcento estis tro alta, tiel, oni decidis konstrui alian apudan ponton el betono, kiu nuntempe deĵoras en tiu fervoja linio.

Kio okazis do kun la fera ponto? Fine, la hispana fervoja kompanio RENFE decidis vendi al ferruba komercisto ĉi tiun kaj aliajn ne-uzitajn pontojn. Hazarde, en la jaro 1975 enloĝanto de la apuda vilaĝo Alamedilla konis grupon de laboristoj, dungitaj por detruai kaj detranĉi la feran ponton. Li tuj sciigis tiun informon al urbestro, kiu, siafoje, plendis antaŭ la registara reprezentanto en la provinco Granada. Tiam, ĉiuj oficialaj instancoj decidis ekigi administracian proceduron kun la celo halti la detruon de la ponto, eĉ civil-gvardioj devis senaktivigi eksplodigilon, kiu estis jam tute preta ĉe bazo de pilastro. Fine, la ponto del Hacho, almenaŭ kiel monumenta civila konstruaĵo ankoraŭ restas stare.

Alternativaj Okazejoj

Mi nomiĝas Edvard' Kroŭski. Mi disponas pri malmulte da tempo por rakonti mian historion, do ĝi estos mallonga. Aŭskultu atente! Eble vi ne kredos min, tamen ĉi ĉio estas vera. Ĉio komenciĝis kiam Rut' -mia edzino- kaj mi ĝuis la unuan tagon de niaj ferioj. Mi stiris mian veturilon ĉe sinua vojo, la aŭtomobilo ja marŝis tro rapide. Tuj, ni troviĝis fronte al granda kamiono, kiu okupis la tutan ŝoseon. La pneŭoj grincis, la antaŭa glaco de la aŭto frakasiĝis. Poste fortega metala kolizio kaj mia lasta memoraĵo: sango kovris la vizaĝon de Rut'.



Poste, mi memoras mallumigitan ĉambron ĉe hospitalo. Mi klopodis memori kio okazis, tiam mi aŭskultis ĝemojn sur la apuda lito. Mia sango frostiĝis kiam mi aŭdis mian nomon...

Edvard'! Edvard'! Rut'! Jen Rut'!
Doktoro, flegisto, iu...
HELPU MIN!

Tiam, mi aŭskultis urĝajn paŝojn, iu respondis mian deliran alvokon. Lampo lumigis la ĉambron. Doktoro kliniĝis super min...

Ŝi estas Rut', mia edzino. Ĉu ŝi fartas bone? Kiel ŝi fartas?

S-ro Kroŭski, via edzino restas en komato. Ni nur povas atendi. Vi nun devas esti trankvila. Vi ambaŭ suferis teruran akcidenton.



Mi memoras kiam la doktoro injektis al mi trunkviligaĵon en mian brakon.

Nun, vi dormos
S-ro Kroŭski...

RUT!
Rut'!

Kaj poste obskureco ĉirkaŭis min, kaj tiu profunda silento...

Rut'!

Poste, vekis min kriantaj voĉoj, mi malfermis miajn okulojn.

Ŝi mortis.

Ve! Ni povis fari nenion pli

Rut', mia kara Runĵo! Tie ŝi estis, sen-mova, pala. Mi ne trovis fortojn por diri ion. Mi eĉ ne povis moviĝi. Tamen, kiam la doktoro kovris ŝian belan vizaĝon per lito-tuko, tiam...

Ne, ne! Mia Dio ne!

S-ro Kroŭski, li estas konscia!

Tiam mi stariĝis. Mi karesis ŝian brunan hararon, ŝian vizaĝon, mi kisis ŝiajn lipojn. Tamen, ŝi estis tute rigida.

Rut'! Runĵo!
Ne foriru!
Vekiĝu, vekigiĝu!

S-ro Kroŭski, ni faris ĉion ebla, tamen ŝi havis tre danĝerajn internajn vundojn.

Mi ankaŭ memoras, ke ili resendis min en la liton.

Rut'! Ne foriru!!

Preparu trunkviligaĵon!

Tuj, doktoro!

Kaj denove inundis min mallumo, kvieteco kaj silento. Sed tiam...

S-ro Kroŭski, ĉu vi povas aŭdi min? S-ro Kroŭski!

Kiu... kiu estas vi?

Tiam, malalta viro sidiĝis apud mia lito. Li uzis blankan kitelon kaj dikajn okulvitrajn.

S-ro Kroŭski, mia nomo estas Dan Burton. Mi laboras en ĉi tiu hospitalo. Mi okupas min pri ĉiuj teknikiloj kaj maŝinoj.

For-iru!

Mi deziras helpi vin. Mi sciis pri la forpaso de via edzino.

Kiel vi povas helpi min? Ĉu vi povas revivigi ŝin?

Ne, Tamen, mi povas sendi vin tien, kie ŝi vivantas.

Kion vi diras? Ĉu la loko kie ŝi vivantas? Ne diru sensencaĵojn! Ve!



Mi povus transporti vin en la *alternativan okazejon* kie ŝi ankoraŭ vivantas.

Ĉu alternativa okazejo? Kio estas tio?

Vidu, post la akcidento ekzistis kvar eblaj okazintaĵoj.

Unu: vi mortis sed ŝi vivis.

Du: vi vivis kaj ŝi mortis.

Tri: vi ambaŭ mortis.

Kaj fine, kvar: vi ambaŭ supervivis.

Tio estas, realo sekvis kvar malsimilajn vojojn. Vi troviĝas nun ĉe la dua ebla vojo el tiuj diritaj. Tamen, ekzistas aliaj alternativaj okazejoj, kiel tiu kie vi ambaŭ supervivas.



La kvara *alternativa okazejo!* Tie, ni ambaŭ supervivis. Kiel mi povus iri tien?

Verŝajne, tiu ne estus taŭga decido, ĉar se vi iras tien, kie vi estas viva, do tie troviĝus du sinjoroj Kroŭski. Pli bone se vi iras en la unuan alternativan okazejon, tie vi estas mortinta.

Sed, ĉe tiu *alternativa okazejo* mi ĵus mortis. Kiel mi povus klarigi ke mi revivis?

S-ro Kroŭski, mi nur povas sendi vin en tiun *okazejon*. Tie, mi ne povus helpi vin, do, vi agus laŭ via decido.



Mi memoras, ke S-ro Burton rakontis al mi siajn teoriojn pri la *alternativaj okazejoj*. Laŭ li iris, li profunde esploris pri biologio kaj statistiko dum dudeko da jaroj. Tamen, mi nur deziris simplan aferon...

Mi simple volas esti apud Rut'!

Se vi konsentas pri ĉio, do, akompanu min !



Mi iris apud S-ro Burton tra longa koridoro, kiu finiĝis ĉe obskura ĉambro plena de maŝinoj.

S-ro Kroŭski, jen la rezulto de miaj studoj kaj laboroj dum pli ol dude jaroj. Jen ĉio!

Ho! Ĉi ĉio estas grandioza!



Nur fina informo S-ro Kroŭski. Mia maŝino povas transporti vin en alian *alternativan okazejon*, sed vi neniam povos reveni ĉi tien denove. Vi restos tie por ĉiam.

Tio, tute ne gravas. Mi nur volas esti apud mia amata Rut'!



Kiam vi atingos tiun *alternativan okazejon*, ĉio estos tute simila. Vi troviĝos en ĉi tiu sama hospitalo. Vi trovos vian liton kaj tie estos via mortinta korpo. Certe, via edzino estos apude plorante. Pri ĉio cetera vi devos zorgi.

Nu, mi estas preta.



Tiam, S-ro Burton metis sur miaj manoj du rondajn metalajn sferojn. Li tuj ekpremis dekojn da butonoj.

Tuj, ambaŭ sferoj malaperis kaj mi troviĝis en la sama hospitalo. Ŝajnis, ke nenio ŝanĝiĝis.

Spiru plenpulme, S-ro Kroŭski !

Preta!

S-ro Kroŭski! Kion vi faras fore de via lito?

Kio? Mi... mi...



Tiam, mi konstatis, ke io ne iris bone. Se mi estis ĉe alternativa okazejo kie mi mortis kaj Rut' vivis, kial li ne surpriziĝis kiam li vidis min viva? Mi iris en mian ĉambron kaj mi malfermis la pordon...

Sankta Dio!



Ambaŭ litoj estis okupitaj. Sur unu, estis mia kara Rut', ŝi kombis sin. Sur la alia, estis homo, kaj tiu homo, tiu homo estis tute simila al mi...



Ŝajnas, ke S-ro Burton ne lerte ekpemis la butonojn. Li transportis min en la kvaran *alternativan okazejon*. Ĉi tie, ni ambaŭ supervivis.

Kaj nun ekzistas du Edvard' Kroŭski !



Tiam, mi memoris la vortojn de S-ro Burton: *...ne ekzistas retrovena vojo.*



Mi devos okupi la lokon de tiu Edvard' Kroŭski.

Mi atendis kaŝite ĝis kiam Rut' kaj la alia S-ro Kroŭski ekdormis. Tiam, mi eniris en ilian ĉambron.



Kio okaz....!!

Silentu !

Mi buŝ-ŝtopis lin per forta rubando. Mi portis lin en la lifton.



Mi multe bedaŭras ĝin, kamarado, sed vi devas malaperi.

mmmmmm

Pere de lifto, mi iris en la subteran etaĝon, tie troviĝis granda kaldrono.



Post kelkaj minutoj vi malaperos, nur kelkaj ostoj restos de vi.

Mi metis la korpon en la kaldronon. Ŝajnas, ke pro la varmo la rubando malstreĉiĝis. Tiel, antaŭ ol morti li kapablis lanĉi teruran krion.



EEEEEEEEEE

Tiu subita ekkrio ŝanĝis ĉion. La kaldrono vanuis kaj mi vekigis en lito de la hospitalo. Doktoro priantis min.



Verŝajne, ĉio estis koŝmaro. Rut' neniam mortis, S-ro Burton ne ekzistis, ĉio estis sufer-songö.



Tie estis mia edzino, kun tiu bela rideto.



Povis okazi kvar *alternativaj* okazejoj, mi pensis. Tiam, Rut' elŝaltis la lampon.



Mi ne scias certe kio okazis. Mi nur memoras, ke forta rubando ŝtopis mian buŝon. Tamen, mi sukcesis stariĝi kaj tie mi estis, kiel ĉe spegulo, fronte al alia viro tute simila al mi.



Mi ne disponis pri multe da tempo. Li kondukis min en la subteran etaĝon, tie troviĝis kaldrono. Mi sentis varmegon apud mia vizaĝo.



Mi scias, ke li venis de la dua *alternativa* okazejo laŭ mi songis kaj siafoje, ke mi venis de la kvara okazejo, kaj neniu eblo ekzistas eskapi el nia... FINO.

nun ni

junularaj paĝoj



Recordamos a todos los hablantes y simpatizantes de la lengua internacional Esperanto, menores de 35 años y que estén interesados en colaborar en un grupo específicamente para jóvenes en el movimiento esperantista andaluz, que pueden contactar con AJEU (Andaluzia Junulara Esperanto-Unuiĝo) a través de la dirección de correo electrónico ajeu@esperanto.ac. No hay cuotas, no hay formalidades burocráticas, solo ganas de hacer cosas. Y, por supuesto, no olvides hacer las propuestas que creas más interesantes para el movimiento esperantista juvenil en Andalucía.

Ni memorigas al ĉiuj parolantoj kaj simpatiantoj de la internacia lingvo Esperanto, malpli aĝaj ol 35 jaroj kaj dezirantaj kunlabori kun grupo specife elpensita por junuloj ene de la andaluzia esperanto-movado, ke oni povas kontakti kun AJEU (Andaluzia Junulara Esperanto-Unuiĝo), pere de la ret-adreso ajeu@esperanto.ac. Neniu deviga membro-kotizo ekzistas, ankaŭ ne burokrataĵoj, nur deziroj plenumi interesajn aferojn. Kaj, kompreneble, ne forgesu proponi allogajn projektojn por la junulara esperanto-movado en Andaluzio.

Los alumnos del curso de esperanto del IES Almenara, en Vélez-Málaga han empezado a colgar sus videos en Youtube a modo de presentación. Ya puedes ver los que han colgado Irene y Patricia en la sección "Esperanto Almenara" en Tubaro:

https://tubaro.aperu.net/k/ytb_UCq74fltFJ9fdYYP0uQGzpQHQ/

Lernantoj de la esperanto-kurso de la Mezgrada Lernejo "Almenara" en Vélez-Málaga, komencis alŝuti siajn videojn en Jutubo kiel mem-prezentado. Vi jam povas spekti tiujn alŝutitajn de Irene kaj Patricia en la branĉo "Esperanto Almenara" ĉe Tubaro:

https://tubaro.aperu.net/k/ytb_UCq74fltFJ9fdYYP0uQGzpQHQ/

Andaluzia Junulara Esperantisto-Unuiĝo - AJEU

nun ni

junularaj paĝoj



Irene kaj Patricia alŝutis videojn en esperanto en Jutubo

Alin, lerta esperantistin'

SALA DE
ESPERA



LA DE
P RA nt



SALA DE
ESPERAntistas





Andaluza Kuirarto

Supo de Alpuharoj aŭ kuirajo de migdaloj

La supo de Alpuharoj, ankaŭ konata kiel kuirajo de migdaloj, estas la varma versio de la fama *ajoblanco*. Ĉi tiu recepto temas pri facila, simpla kaj ekonomia plado, ĝi estas facile preparebla ka gustuminda se vi vojaĝas en Alpuharojn, tiu belega regiono inter Granado kaj Almerio, piede de altaj neĝ-kovritaj montoj.

Jen la ingrediencoj por 4 homoj:

- Aljeroj 4.
- Oliv-oleo.
- Migdaloj, proksimume 25.
- Malmola pano, 3 tranĉaĵoj.
- Kokin-buljono, ½ litro.
- Frititaj pantranĉaĵetoj.
- Malmole kuiritaj ovoj, 2.
- Ŝinko, tranĉaĵetoj 100 gr.
- Cepo, ½.
- Petroselo
- Raspita tomato.
- Safran-koloraĵo.



Migdaloj



Malmole kuiritaj ovoj



Safran-koloraĵo



Ajlero



Kokin-buljono



Ŝinko



Cepo



Oliv-oleo



Petroselo



Malmola pano



Frititaj pantranĉaĵetoj

Kaj jen la preparado:

1) Ene de pato, ni fritas ajlerojn, kaj migdalojn. Temas nur pri leĝera fritado. Post eltiri la ajlerojn kaj migdalojn ekfrititajn el la pato, uzu tiun saman oleon por friti malmolan panon.



Ajleroj kaj migdaloj estas frititaj.
Uzu andaluzian oliv-oleon.



Uzu tiun saman oleon por fritti
malmolan panon.

2) Poste, enmetu ilin en elektran kirlilon, aldonu plenkuleron da kokin-buljono, por atingi pli perfektan kirladon

Elektra kirlilo



3) En kaserolo ni varmigas la kokin-buljonon. Poste, verŝu la antaŭan kirlaĵon ene de la varmiganta buljono. Aldonu salon, se necese.



4) Ni fritu la duonan cepon. Aldonu safran-koloraĵon kaj se tion vi deziras, ankaŭ raspitan tomaton. Atentu, ĉi recepto ekzistas *kun* kaj *sen* raspita tomato. La rezulto de unu aŭ alia versio estas la fina ruĝa aspekto de la supo. Aldonu ankaŭ tranĉaĵetojn de ŝinko.

5) Ni aldonu ĉi ĉion en la supon. Varmigu la tutaĵon dum kvin minutoj.



6) Prezentu la pladon kun malmole kuiritaj ovoĵ, iomete da ŝinko kaj frititaj pantranĉaĵaĵoj. Ornamu la pladon kun petroselo.



BONAN APETITON !



Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La homo de la sako

De antaŭ multaj jardekoj, la homo de la sako estas mita figuro uzita de gepatroj, kun la celo timigi la plej etajn infanojn: "*Ne faru tion, se male, la homo de la sako venos kaj li forportos vin*". Sed eble, oni ne scias, ke efektive antaŭ multaj jaroj ekzistis tiu homo de la sako kaj verdire li estis timinda. Jen historio kiu vere okazis.

En la jaro 1910 en Gador, vilaĝo de la provinco Almerio, Agustina Rodríguez, maljunulino asertanta, ke li kapablis sanigi, klopodis kuraci de tuberkulozo al Francisco Ortega. Ŝi ne sukcesis fari tion pere de siaj kutimaj preĝoj, do ŝi serĉis alian solvon. Pro tio, li kontaktis kun alia ĉarlatano, la barbiro de la vilaĝo Francisco Leona. Post babiladoj inter ili kaj la malsanulo, ili decidis, ke sango de infano ĵus verŝita estus la sola solvo por tiu malsano.

Francisco Leona konvikis al Julio Hernández, konata kiel "la idioto". Ili ambaŭ devus trovi kaj kidnapi etan infanon.



La homo de la sako, ne tiel mita figuro

Unuamomente, Julio trovis infanon sur-strate, tamen ŝi multe kriis por eviti la kidnapon, do, li rezignis sian unuan ideon. Post nova provo, la kidnapantoj trovis alian infanon, la sep-jaraĝan Bernardo. Julio kaptis la infanon kaj Francisco enmetis lin ene de sako, tio okazis la 28-an de junio 1910.

La agado de Agustina kaj Francisco Leona estis terura. Por atingi la sangon de la infano, la barbiro tranĉis la akselojn de la etulo kaj tie mem, la malsanulo trinkis lian sangon. Poste, oni eltiris la grason de la korpo de la infano kaj Agustina ŝmiris per ĝi la

bruston de la malsanulo. Kompreneble la eta Bernardo mortis.

Post kelkaj horoj, la gepatroj de la infano timis pro la foresto de sia filo, do ili decidis peti helpon en la civil-gvardia kazerno. Samtempe, Julio, unu el la kidnapistoj, ĉeestis la saman kazernon por sciigi, ke li trovis kadavron de infano en la kamparo. La aŭtoritatuloj ne suspektis, ke li estis la murdisto, pro la fakto, ke neniu deliktulo sciigas pri la eltrovo de sia viktimo.

Do, kiamaniere fine akuzitoj estis eltrovitaj? Nu, ekde la unua momento loĝantoj en Gador pensis, ke la kulpuloj de la foresto kaj poste la murdo de la infano estis la sanigantino kaj la barbiro, en la vilaĝo ili estis tre bone konataj kaj ili ricevis ĉies suspektojn. Tiel, gadoranoj decidis realigi elprovon, kiu laŭdire estus elmonro de la Dia justico.

Kelkaj enloĝantoj de la vilaĝo metis la korpon de la mortinta infano ĝuste sur centra placo de Gador. Tie, ĉiuj devis stariĝi antaŭ la kadavro. Laŭ popolaj onidiraĵoj, tuj kiam la kulpulo troviĝus antaŭ la korpo de sia viktimo, ĉi tiu foririgus la murdiston en la inferon. La barbiro konis, kaj timis, tiun legendon, do, li ne akceptis stari antaŭ la korpo de la infano. Tiel, la gadoranoj sciis, ke la barbiro estis la kulpulo. Kompreneble la policianoj trovis alian pri kredeblan pravigon de la krimo. Julio Hernández, kiu certe ne

tre klera homo, rakontis al najbarulo en Gador, ke li estis apude kiam Francisco kaj Agustina murdis la infanon. Ili estis tuj arestitaj kaj oni sciis la tutan veron pri la teruraj okazintaĵoj. Tiel, la respondeculoj de la krimo estis baldaŭ malkovritaj kaj ĉiuj krimuloj arestitaj.



Francisco Leona, konsiderita kiel "La homo de la sako"

La barbiro mortis kelkajn monatojn poste en la malliberejo. Juĝo komenciĝis en la urbo Almerio fine de la jaro 1911. Tie, ĵurio de 12 homoj kaj 5 profesiaj juĝistoj decidis kondamni je mortopuno al Francisco Ortega, Agustina kaj Julio. Oni ekzekutis ĉiujn ilin, escepte Julio, kies morto-puna kondamno estis komutita al dumviva enfermiteco.

Verŝajne, nuntempaj junaj gepatroj feliĉe jam ne timigas siajn filojn per la rakonto de la homo de la sako, tamen tiuj minacoj ankoraŭ restas ene de la menso de la plej maturaj en Andaluzio, kiuj neniam povis imagi, ke tiu historio havis realan bazon.



Krucvorto

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G
1								
2			■					
3					■			
4							■	
5			■		■	■		
6								
7								
8						■		

HORIZONTALE

- Granda metalvazo por kuiri aŭ boligi.
- Prepozicio uzata por montri devenon. ■ (Akuzative) Profesiulo.
- Simple konstruaĵo el tabuloj. ■ Rilata aŭ apartenanta al subjekto.
- (Inverse kaj adverb) Meritanta respekton kaj admiron. ■ Sur la germanaj aŭtomobiloj.
- Komenco en tiuj simplaj vortoj uzitaj por demandi. ■ Simbolo de mezuruno de pezo, valoranta 1000 kilogramojn. ■ ■ (Inverse kaj sen la lasta vokalo) membro de grupo.
- (Inverse kaj adjektive) Trinkejo aŭ vesperkunvenejo, kie oni prezentas kanzonojn.
- (Inverse kaj akuzative) Fortika metala stangeto, kies enŝovo en truon aŭ specialan ingon malhelpas la malfermon aŭ movon de pordo.
- (Inverse) Ĉiu el la du malantaŭaj aperturoj de la nazkavo en la buŝo ■ Sufikso uzata por derivi vortojn, indikantajn unu el la egalaj partoj de tuto.

VERTIKALE

- A. Civitano de ĉefurbo de kanada provinco.
B. (*Akuzative*) Mineralo el kiu oni ekstraktas alunon.
C. Sur la luksemburgaj aŭtoj. ■ Partikulo montrantan logikaj sekvon aŭ konkludon. ■ (*Inverse kaj adverbe*) Ĉiu el la du flankaj partoj de la nazo.
Ĉ. Optika mezurunuo.
D. Ofta mallongigo de la monunuo Rupio. ■ Simbolo de la baza unuo de longo en la internacia sistemo de mezurunuoj. ■ (*Sen la lasta vokalo*) Mamulo, kies virbesto portas grandan platan ramuron.
E. (*Inverse*) Profesiulo. ■ Sur la aŭtomobiloj de Bulgario.
F. (*Inverse kaj Akuzative*) Nedifina pronomo, reprezentanta iun objekton, aferon, ideon ■ (*Inverse kaj akuzative*) Apartenanta al ni.
G. (*Inverse*) Civitano de insularo norde de Skotlando.



SOLVOJ AL LA KRUCVORTO DE LA PASINTA NUMERO

A	Ŭ	T	O	B	U	S	O
L	A	R	V	O	■	E	R
A	K	I	O	T	S	■	A
M	N	E	M	O	N	I	K
B	A	T	■	■	E	L	O
I	■	A	L	A	J	O	L
K	A	Ĝ	■	R	L	■	O
O	D	A	R	■	O	N	J

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

Estraro

Prezidanto / Presidente:
Vicepresidente / Viceprezidanto:
Sekretario / Secretario:
Kasisto / Cajero:
Voĉdonantoj / Vocales:

Directiva

Ángel Arquillos López
Fátima Jiménez García
José M^a Rodríguez Hernández
M^a Dolores Torres Mateo
Jordi Lietor López
Juan García del Río
Carlos Spinola
Alejandro Burgos Escalante
Juan Díaz Casado

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)
TTT-paĝo / Página web: www.esperanto.ac
Tvitero / Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)

[Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:](#)

Federación Española de Esperanto: www.esperanto.es
Asociación Universal de Esperanto: www.uea.org





Congreso Europeo de Esperanto

"Diálogo entre los pueblos europeos, un aporte de paz"

Estrasburgo, del 8 al 12 de mayo de 2024